Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Tel. 00-31-10-436-1044; retpaĝaro: www.uea.org

from their parents.

What makes Esperanto different is the factors that control its growth and evolution.

Whilst most modern languages carry around with them a vast amount of historical baggage leading to a lack of systematicity – which can be such a headache for adult foreign learners – Esperanto, through the agency of the values of the Esperantists, imposes a discipline on the development of the language which requires largely that no evolutionary path be permitted which seriously undermines the regularity and systematicity of the language.

You have only to look at the spelling systems of French and

English to see how such languages differ from Esperanto in the extent to which they permit divergence from a simple pattern.

"Artificial, and proud of it"

If some bumptious linguist with ideas above his station wishes to engage with you in disputatious argument, feeling empowered by his knowledge of natural languages to have all manner of opinions about Esperanto, then your position should be Esperanto is artificial, and proud of it. There would be little point to Esperanto if it were to ape the nastier habits of natural languages. And, to boot, what does he know of artificial languages?

Terry Watts

'Bonega renkontiĝo' en Aylesford

De la 23a ĝis la 26a de septembro mi partoprenis bonegan internacian Esperantan renkontiĝon.

Mi estas bulgarino, tamen nuntempe mi loĝas en Anglio. Longan tempon mi serĉis samideanojn en Milton Keynes. Finfine mia konato Malcolm Jones donis al mi la telefonnumeron de Terry kaj Anica Page. Dank' al ili mi denove estas civitanino de Esperantujo. Ili invitis min partopreni la renkontiĝon ĉe The Friars, Aylesford. La travivaĵo estis mirinda.

La antikva monaĥejo funkcias kiel moderna konferenca centro kaj hotelo. La kondiĉoj estas tre bonaj. La dormĉambroj estas puraj kaj agrablaj. La manĝaĵoj estas sufiĉaj kaj bonaj. Ĉirkaŭ la monaĥejo estas florgardeno kaj bela parko. Apud la monaĥejo fluas rivero Medway. Kompreneble estas preĝejo, kiu estas malnova. Ĝi estas vizitata de turistoj kaj lokaj homoj.

Je la 24a de septembro mi konatiĝis kun aliaj partoprenantoj de la renkontiĝo. Ni vere estis internacia grupo – el Bulgario, Slovenio, Hispanio, Japanio, Finnlando, Madagaskaro, Aŭstralio kaj Anglio. La etoso estis amikeca kaj amuza.

Ĉiuj partoprenantoj parolis koncize pri la temo 'Ora aŭtuno'. Iuj parolis pri la sezono aŭtuno en aliaj landoj, aliaj pri la valoro



de aŭtuna aĝo aŭ de oro.

La programo estis varia kaj abunda. Krom la prelegoj pri la temo estis ankaŭ ludoj, prezentaĵo de poŝtmarkoj, kio klarigis la inflacian epokon en Germanio, japana arto *furoŝiki*, lingvaj defioj. Estis prelegoj pri festotagoj kaj memoraĵoj en Slovenio, pri someraj kaj aŭtunaj floroj, pri la vivo de vespoj, scienco pri folioj, rolo de gepatroj en edukado, kaj aliaj.

Ni faris ekskursetojn apud la rivero Medway kaj la urbeto. Ni ĝuis la aŭtunan naturon kaj



ekkonis iomete la historion de la urbo Aylesford. Tie ĉi estas la plej malgranda drinkejo en Anglio. Ĝi estas pli ol 100-jaraĝa. La malnova ponto de la rivero estas interesa konstruaĵo.

La lastan vesperon ni havis distran mikspoton kun kantoj, anekdotoj kaj dramo, verkita de jugoslava aŭtoro Branislav Nuŝiĉ. Ĉiuj estis kontentaj kaj amuziĝis.

Mi varme rekomendas partoprenadon en la renkontiĝo venontan aŭtunon. Mi mem intencas partopreni en ĝi.

Magdalina Georgieva



Plej supre (maldekstre): Partoprenantoj apud la artisma nomŝildo de Aylesford, Kent; (dekstre): Surplanka 'Skramblo'-ludo, kiun gvidis Roy Simmons. Sube (maldekstre): Prilingvaj defioj cerbumigas la amikaron; (dekstre): Antaŭdisiĝe, gastpreleganto Kevin Murray (plej maldekstre) kun aŭskultintoj.

Who was the first British Esperantist?

The English Wikipedia tells us that "In the *Unua Adresaro*, an early directory of supporters of Esperanto, Richard Geoghegan appears as number 264." It goes on to call him, under a photo, "first Esperantist in the English-speaking world". The Esperanto Vikipedio makes a more cautious claim, calling him "ŝajne la unua angle parolanta esperantisto".

The booklet called, in full, *Adresaro de la personoj kiuj ellernis la Lingvon < Esperanto >, serio 1, 1889*, does indeed list the first thousand learners, but it does not give them numbers, nor is there any indication that these names are listed in order of registration; indeed they are in alphabetical order. Giving his new address in Tacoma, Washington, seven years later, Geoghegan gives himself the number 264 – see *Novaj Esperantistoj Serio XVI, 1896* – but numbers were not published for the first thousand.

It is certainly true that there are very few British citizens who appear in a list overwhelmingly packed with citizens of the then Russian empire. By my calculations, 956 of the first thousand were Russians (including Poles, Ukrainians and residents of the Baltic countries).

So who are the other contenders for the crown of "The First British Esperantist"? One candidate is Pierce Essex O'Brien Butler (1858–1954), son of an Irish aristocratic family. He would certainly have considered himself British. He was educated in Germany, then served as interpreter with Her Britannic Majesty's Consular Service in 1880 in China, acting as Pro-Consul between 1888 and 1893 in Tainan, Taiwan. His address in

the first *Adresaro* is given as "H.B.M. Consular Service, China, H" (this letter signifying Ĥinuĵo, the word used for China in the language's early years).

Another aristocratic candidate, this time from Northern Ireland, is James Douglas of Glenarm Castle, County Antrim.

A third contender is C.K. Fletcher of Birkenhead, the very same town on the Wirral where Geoghegan was brought up. In fact Richard Geoghegan is not the only person of that surname listed. Listed with him, and presumably recruited by him are his mother B.G. (Bessie Gertrude) Geoghegan of Birkenhead and James T. (Theodore) Geoghegan of Liverpool. Also from Liverpool are James A. Hinchliff and John Mercer of the International Patent Office there.

Finally there is another woman – far from a token woman, namely Helen Schultess-Young, from a legal and literary family in London.

It is not known which of those listed besides Geoghegan continued to use the new language, but it is not possible on the evidence currently available to say with confidence who the first Briton was to use Esperanto.

In the autumn of 1887, when the language Esperanto had just appeared, according to Richardson (*Shamrocks on the Tanana*, 2009) it was not Geoghegan but his friend Walter J. Crawhill, who read an article about the new international language and immediately wrote to Dr L.L. Zamenhof in Latin, but Geoghegan was able to use the German edition of his 'Unua Libro' which Zamenhof sent.

Centenary of W.T. Stead's death on the Titanic

A conference marking the centenary of W.T. Stead's death on the *Titanic* and commemorating his life and achievements will take place in April at the British Library in London.

The conference aims to recover his extraordinary influence on English culture from 1870 and, in his spirit, it will investigate the current revolution in newspapers and print journalism.

When Stead died, he was a towering presence in Britain and the US. An inveterate campaigner, he pursued imperialism, social reform – and purity, international peace and women's rights. As editor and publisher, he pioneered the new journalism and the modern tabloid. His advocacy of 'government by journalism' helped launch military and parliamentary campaigns. His exposé of child prostitution raised the age of consent to 16, yet he was jailed for his investigative journalism.

Needless to say, he was also a champion of Esperanto. The London Esperanto Club was born in W.T. Stead's office in The Strand; later the Club became the basis for the national movement. Stead not only promoted Esperanto but was also BEA's first treasurer. Paul Gubbins gave a talk on him at the British Esperanto Congress in Felixstowe.

Although the conference lecturers have already been chosen, it is possible to take part in discussions, etc. (the fee is quite high).

Having learned the language from this book, a while later Geoghegan received from Zamenhof the first copies of the same book in an English translation by a Warsaw enthusiast. Geoghegan warned Zamenhof that this translation was a poor one, probably not by a native speaker, and it would bring Esperanto into disrepute in the English-speaking world. As a

result, Zamenhof asked Geoghegan to produce a more suitable translation himself, which he did. The original faulty translation was withdrawn, and in 1889 Geoghegan's version was published, taking the place of the earlier version.

Geoghegan can certainly lay claim to be the first propagandist of the new language.

Hilary Chapman

<http://www.lzs.lt> kaj en maldekstre-suba angulo de la frontpaĝo, klaku al la dezirata numero de LS: 'Litova Stelo N-ro ...'.

Agrablan legadon!

Vytautas Šilas,
redaktoro de *Litova Stelo*



Aŭskulti aŭ legi pri sukcesaj universitataj kursoj en Poznano

Estimataj!

Vi povas legi pri la sekvaj sukcesaj Poznanaj eventoj ĉe <http://edukado.net/novajhoj?id=173>:

– nova, jam 5a interlingvistika grupo en UAM (sesio 17–21 sept.);

– 2a Interlingvistika Simpozio 'Interlingvistiko kaj esperantologio antaŭ la defio de la 21a jarcento' (22–23 sept.);

– novaj diplomitoj de la trijaraj Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj de la Instruista Trejnadado de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI.

Vi povas aŭskulti intervjuojn pri la Poznanaj aranĝoj en la Pola Retradio (<http://retradio.posterous.com/>):

– 26 sept.: partoprenantoj (ekde la 10a min.);

– 30 sept.: Ilona Koutny (ekde la 5a min.) – interalie ankaŭ pri universitata premio pro interlingvistika agado.

Prof. Ilona Koutny, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj
Universitato Adam Mickiewicz
al. Niepodleglosci 4
PL-61-874 Poznań
Tel. +48 61-829-36-75
<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>



Nova muzeo en la interreto

Estimataj gesamideanoj,

Antaŭ tri jaroj, la 20an de septembro 2008, ni, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, inaŭguris novan Esperanto-muzeon en urbo Svitavy, kaj vi apartenis al niaj unuaj gratulantoj.

Mi ankoraŭfoje dankas al vi pro tiama bondeziraĵo kaj invitas vin por viziti la muzeon.

Se vi ĝuste nun ne planas vojon al Ĉeĥio, vi povas viziti almenaŭ nian retpaĝon <www.muzeum.esperanto.cz>.

Jirka Tomeček



Legi numerojn de *Litova Stelo*

Karaj gesamideanoj,

Ĉefe pro financaj kialoj, malfruigas eldonado de la pasintjaraj numeroj (n-roj 4–6) de la revuo *Litova Stelo*. La prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, P. Jegorovas, informis, ke post kiam venos "pli bona tempo" la revuo povos esti plue eldonata. Do, por via intereso nun mi ofertas la e-variantojn de la revuoj (ĉiujn n-rojn de 2010).

Litovaj esperantistoj fruktdone kunlaboras kun Litova Ĵurnalista Asocio (la litova siglo LZS). Ĝi kompleze konsentis la interretan publikigon de *Litova Stelo* en sia retejo. Iru do al:

Dezirata saluti kaj korespondi

Saluton karaj amikoj,

Mi korvarme venas antaŭ vi kiel frato esperante. Mi estas 22-jara kongano loĝanta precize en Rutshuru, apud la limlando de DRK kaj tiu de Ugando. Mi tre ŝatas pluigi salutmesaĝojn en nur Esperanto kun vi.

Mi korespondas ankaŭ per poŝto: P.O. Box 08, Bunagana-Kisoro, Ugando.

Joel Muhire
muhire.joel@yahoo.fr



Ĉu mongola–brita diskutejo?

Saluton!

Mi volas proponi al vi ion. Mi jam havas mian profilon en www.facebook.com. Vi povas trovi min sub la nomo Batzaya Tsagaan-Taiji. Sed en la vizaĝlibro mi estas komencanto, ĵus antaŭ kvar aŭ pli da monatoj kreis mian profilon. Ĵus mi kreis ankaŭ la specialiĝintan diskutliston: (grupon) sub la nomo: 'Societo de Mongolaj kaj Rusaj Esperantistoj' kaj 'Societo de Mongolaj kaj Japanaj Esperantistoj' ktp.

Kial ne imiti la ekzemplon la alilandaj esperantistoj kaj krei similan societon de 'nacia–nacilandaj esperantistoj' ĉe *Facebook*? Ĉu iu inter vi subtenas kune krei tiun grupon? La nomo ja estas antaŭsigno de bona disvastigo de nia komuna lingvo en ambaŭlandaj interesoj. La celo de tiu societo ja ĝuste taŭgas al tiuj interesoj. Ankaŭ en via lando, certe iu volas lerni la

mongolan pere de Esperanto.

La celo de grupo estas ekkonigi ambaŭlandajn kulturojn kaj lingvojn pere de Esperanto. Kiel vi opinias?

Batzaya Tsagaan-taiji
<batzaya@yandex.ru>



Helpo petata al Tanzanio

Estimataj,

Jen mi transdonas iom urĝan peton de samideano, UEA-delegito, sinjoro Mramba Simba Nyamkinda en Tanzanio.

Mramba loĝas en la okcidenta parto de Tanzanio, nur 50 kilometrojn for de la Viktoria Lago; lia vilaĝo troviĝas oriente de Bunda urbo, kaj ĝia nomo estas Marambeka. Tie li loĝas kaj laboris kiel vestokudristo kaj

kamparana terkultivisto. Mi persone renkontis lin en 1988, ĉe ILEI-konferenco en Nederlando: mi tre ĝuis la interkonatiĝon kaj liajn rakontojn pri la vivo en 'fora lando'. En la jaro 2005 oni elektis lin al la posteno de la vilaĝarestro, en kiu li reprezentis 14 000 homojn de kvin vilaĝoj ĉe la Bunda distrikta magistrato.

En la jaro 2007 li fondis lokan organizaĵon nome 'Mazingira Community Development Forum', kiu celas helpi la distrikton de Bunda (www.kono.be/mazingira). Per tiu organizaĵo, danke al esperantistoj, li povis vojaĝi al Eŭropo en 2007 kaj 2008 por prelegi en Nederlando, Belgio, Germanio kaj Francio. Post la prelegoj multaj esperantistoj decidis subteni diversajn projektojn de Mazingira.

Ĝis nun Mazingira jam subtenas ĉirkaŭ 400 orfojn; oni konstruis 20 profundajn putojn, ses klasĉambrojn, administran konstruaĵon; oni plantas arbojn, donas mikrokreditojn al virinoj kaj jam finkonstruis domon kun ses ĉambroj por radio-elsend-projekto.

Ĝuste pri tiu radio-projekto nun temas. Mazingira decidis starigi ĝin por instrui al la komunumo diversajn aferojn: i.a. pri sano, medioprotekto, aidoso, ... kaj pri Esperanto.

Por ekigi la projekton, Mazingira jam sukcesis pagi por licenco kaj aliajn devigajn pagojn al la ŝtata 'Tanzania Communications Regulatory Authority (TCRA)'. Farinte tion, oni nun rajtas kunigi la elsend-materialojn kaj komenci la elsend-programojn – sed la licenco starigas tempolimon, pro tio la urĝeco de la peto.

Post iom da korespondado kvinopo da esperantistoj en Jorkŝiro kunmetis sufiĉe da mono por kovri la kostojn de aĉeto kaj ekspedo – kaj de doganimposto en Dar-es-Salamo.

Poste tamen venis plia peto – kiun ni nun deziras plenumi, espereble per la helpo de pli vasta brita samideanaro! La kondiĉoj de TCRA nun devigas la starigon de plia 'stacioto' kun antena masto sur monteto, 15km for de la ĉefa elsendejo – kaj tio kompreneble bezonigas plian ekipaĵon, kiu kostos ... fakte eĉ pli ol la komenca elsendilo. Ni provas esplori malpli kostajn sistemojn, sed TCRA ne permesas ĉion ajn. Ĝis nun ni ricevis taksojn de 2 ĝis 3 mil eŭroj por la ilaro.

Do, mi petas vin pripensi viajn emojn kaj eblojn. Se vi povus donaci iomete aŭ iomege, bonvolu kontakti min (mjesperanto@btinternet.com) kaj ni diskutos la (p)agmanierojn.

Dankon pro via atento, antaŭdankon pro via helpo!

Pliaj informoj pri Mramba troviĝas ĉe: http://eo.wikipedia.org/wiki/Mramba_Simba_Nyamkinda.

Malcolm Jones

A joke on Radio 4

I was half-falling asleep and half listening to Rory Bremner on Radio 4 one night when I suddenly heard a joke in Esperanto! I was so excited I missed the punchline and had to listen to it the next day on i-player!

Here is a lovely response to an e-mail I sent via Nick Doody's agent.

Elizabeth Stanley

Dear Elizabeth,

Thank you so much for your e-mail, which my ex-agent passed on.

I knew there would be someone out there listening who would appreciate a joke in Esperanto. There was some discussion as to whether we should include an English explanation, too, but I thought it was funnier to suggest that the Radio 4 audience are so linguistically adept that it would go without saying that they'd all understand Esperanto. In fact, I explained the joke to them 'off air', as it were, and also primed them to react as though they all understood it (and later to gasp in horror when informed that there are people in Britain who *ne parolas Esperanton*).

Regarding the source of the joke, it's an old one of mine (I think I wrote it in about 1992!). The translation was mine, too, with a little help from some online resources. I don't pretend to speak Esperanto at all well, but I've always been interested in languages (my degree was in French and Spanish) and what little knowledge of Esperanto I have dates from about the age of 12 or 13, when a friend of mine brought an old *Teach Yourself Esperanto* book to school, and I devoured it over the course of a lunch break. As a result, I have little in the way of vocabulary, but of course the structures and grammar are so simple and regular that it's hard to forget them, even more than 20 years after what was basically a half-hour crash course.

Anyway, thank you once again for what must be the most entertaining Radio 4 response I think I've ever had to a joke. It's always a lovely thought that someone out there 'gets' those little touches that we put in 'just for ourselves'; so much more satisfying to have it confirmed. Your e-mail made my day.

Nick Doody

[It is available online at <http://bit.ly/tzWTEY> or <http://www.bbc.co.uk/programmes/b01615g5>.]

Lokaj grupoj de JEB kaj tutlanda renkontiĝo

www.jeb.org.uk

Ĉi-jare ni decidis, ke JEB celos labori kun homoj, kiuj volas starigi aŭ jam havas siajn proprajn Esperanto-grupojn. Ni kontaktis gejunulojn en diversaj lokoj en Britio por informiĝi pri la stato de la junulara movado.

Nova Kembriĝa grupo

Chris Kerr, kiu studas ĉe la Universitato de Kembriĝo, lastatempe starigis novan grupon tie. Ĝi estas tre sukcesa. Ĝi havas ĉirkaŭ 10 membrojn kaj kunvenas ĉiu-semajne. Tim Morley, kontata esperantisto, ankaŭ komencis doni lecionojn al komencantoj tie. Antaŭ kelkaj semajnoj, la junulara klubo de Bratislavo, Slovakio, vizitis ilin.

Brita Renkontiĝo en marto

Pro la agado de la gejunuloj en Kembriĝo, ni en JEB decidis, ke JEB organizos internacian semajnfinan aranĝon tie. La Brita Renkontiĝo okazos la semajnfino de la 9a ĝis la 11a de marto 2012. Ni nuntempe antaŭmendas kongresejon kaj planas amuzan programon, kiu ankaŭ inkluzivos kurseton por komencantoj. Estas informoj pri la aranĝo en nia nove ĝisdatigita retpaĝo.

Ni kontaktiĝis ankaŭ kun Rowland Goodbody, studento en sia unua jaro ĉe Oksfordo. Li ankaŭ interesiĝas pri starigo de



Du bildoj el la vizito de la junulara klubo de Bratislavo al la nova grupo de Kembriĝo

societo. Ni en JEB intencas prepari lernilojn kaj varbilojn por helpi gejunulojn, kiuj volas ekigi Esperanto-grupojn.

Bonvenega donaco

Tre surprize, JEB lastatempe ricevis konsiderindan donacon de Stephen Thompson, kadre de La Esperanto-Grupo de Morecambe Bay. Ni ĉiuj estas tre dankemaj pro tio! La mono estas tre bona por helpi nin kun la organizado de la 1a Brita Renkontiĝo.

Andaluzia Esperanto-Kongreso

Jam de kelkaj monatoj mi loĝas en Hispanio. En oktobro mi vojaĝis al Seviljo por la 16a



Andaluzia Kongreso, kiu okazis tie por festi 100-jarojn de la Esperanto-asocio de tiu urbo. Mi pasis tute bonan semajnfino. Ĝi estis mia unua kunveno post la Brita Kongreso en Eastbourne, kaj la du aranĝoj estis tre malsamaj. Pro la okazaĵo de la datreveno, la kongreso estis senpaga. La Andaluzia Kongreso estis pli malgranda afero, pli kiel renkontiĝo de bonaj amikoj. La unuan vesperon ni eliris por vidi la urbon (tre belan) kaj iris al manĝejo, kie ili invitis nin al la tipa plado de Seviljo, frititaj fiŝoj.

La andaluziuloj estas festemaj, sed ankaŭ krokodilemaj! Ĉe Brita Kongreso oni preskaŭ neniam krokodilas. Estis strange, ke ĉeestis kelkaj homoj, kiuj tre fieras pri Esperanto kaj venas al ĉiuj kongresoj sed ne povas diri eĉ "Kiel vi fartas?" nek "Mi nomiĝas ..."! Estis kelkaj aliaj, kiuj tute bone parolis Esperanton,



Daniel White admiras andaluzianinon ĉe la 16a Andaluzia Kongreso de Esperanto.

- **Itala marŝo kun pozitiva sekvo**

Fine de septembro Itala Esperanto-Federacio partoprenis en informa agado ĉe tutlanda 'Marŝo por paco'. Dudeko da volontuloj staris en loko, kie marŝantoj (200 000) pasas. Tie grandaj literoj prezentis nepre vidata la vorton 'Esperanto', kaj tiuj, kiuj montris intereson ricevis flugfoliojn. Oni dum du horoj disdonis entute 5 000 antaŭpretigitajn informilojn.

Efiko je la aliĝo al la retaj kursoj estis tuj konstatebla la postan matenon. Pro tiu organiza klopodo oni ne multe partoprenis la postan "Tagon de lingvoj".

- **Esperanton elektis korea movado kontraŭ premedukado**

Ok-persona grupo da sudkoreaj adoleskantoj finlernis Esperanton en la Internacia Kultura Centro de Herzberg, Germanio. Du instruistoj iliaj akompanis ilin – entute dek personoj. Ili apartenas al tiel-nomata 'Libera Lernejo por Gelernantoj', movado kontraŭ preminstruado en Sudkoreio, kaj jam lernas Esperanton dum du jaroj. Tiu movado elektis instrui Esperanton anstataŭ la angla. Post Herzberg, dum du tagoj, ili

kompreneble, sed mi neniam antaŭe vidis tiom da Eternaj Komencantoj en unu loko! Sed ĉiokaze la homoj estis tre afablaj kaj tre bonvenigaj. Kaj ili ĉiuj fieris paroli la nekutiman andaluzian dialekton – io, kio plaĉis al mi pro mia deveno el Liverpolo!

Dum la kongreso la gejunuloj proponis starigi sian propran andaluzian junularan asocion, AJEU. Ili klarigis, ke ili intencas gastigi la Iberan Renkontiĝon en sia regiono, kaj de tie venis la ideo por la kunveno de JEB en Kembrigo.

Daniel White
JEB-Komitato
komitato@jeb.org.uk

- **Robert Phillipson en Italio**
Kun partopreno de Robert Phillipson, emerita profesoro de la Kopenhaga Komerca Altlernejo, jam aŭtoro de la libro *Linguistic Imperialism* (1992), la Esperanto-Radikala Asocio por lingva demokratio (ERA; <<http://www.linguainternazionale.it/>>) organizis prezentadojn de la itallingva versio, kiu aperis sub la titolo *L'imperialismo linguistico inglese continua* (Pludaŭras la anglalingva imperiismo) (vidu dekstre la kovrilon).

Ili okazis fine de oktobro ĉe la Roma sidejo de ERA kaj en la gazetara salono de la Ĉambro de la Deputitoj kun la aŭtoro, la sekretario de ERA Giorgio Pagano, la deputito Marco Beltrandi kaj invititoj.



Prof. Phillipson pritraktis la saman temon ankaŭ en Universitato de Parma. Interpretis kaj tradukis juna volontulo, kiu ricevis salajron de la ŝtato anstataŭ la monatribuo pro senlaboreco.

vizitis la lokan klubon en Bourg-en-Bresse, ĉe Liono, Francio, kaj antaŭ sia hejmvieno fine de novembro ili vizitis esperantistojn en Parizo. (Informis Michel Fontaine.)

- **Alvokas gejunulojn por teatro**
Ĉe projektita eŭropa Esperantlingva teatrolernejo en 2014, 27 gejunuloj kunvivis kaj laboros dum dek monatoj, ligitaj per pasio pri teatro por ludi poste en ĉefurboj de Eŭropa Unio. Tiu teatra altlernejo akceptos po unu studento el ĉiu lando de Eŭropa Unio, ĉu parolanta aŭ ne Esperante. La komunikilo estos Esperanto, progresive instruata. Vidu aliĝilon ĉe <www.dlptheatre.net/Esperanto>. Asocio Morgaŭ la Printempo (Demain le Printemps), 14 rue de la Tour d'Auvergne, FR-75009 Paris. Rete: morgau.la.printempo@gmail.com; www.facebook.com/morgaulaprintempo.

- **Lingvo ne verda, sed blua**
León Bollack (1859–1925), creator of the language project Bolak or Langue Bleue, was born

in the same year as Zamenhof. While the two men were Jews and both wanted a more peaceful world, their approaches to language creation differed widely. The fact that Bollack invested huge sums in his unsuccessful project shows that finance is not the only challenge facing the initiator of a planned language. (The article 'Léon Bollack and His Forgotten Project' can be downloaded at <http://fiatlingua.org/?p=79>.)

- **Seán Ó Riain 'multlingva ambasodoro'**

Nova ero ĉe la 'Filmejo' de edukado.net estas la titolo 'Seán Ó Riain – multlingva ambasodoro de lingvoj'. Temas pri 10-minuta intervjuo anglalingva fare de 'British Council', Bruselo, kadre de la projekto 'Language ambassadors' por la retejo poliglotti4.eu.

La programo aperis okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj. Seán sukcesis iom paroli pri Esperanto, kaj aparte pri ties lernfaciligaj ecoj. La intervjuo estas trovebla en la paĝo: <http://edukado.net/biblioteko/filmejo?iid=76>. □

Esperanto- aranĝoj

☆ Plena listo de aranĝoj estas konsultebla ĉe la retpaĝaro www.ventoj.hu. Se vi deziras rigardi mapon de aranĝoj, iru al: www.esperantoland.org

13–15 januaro
Ni festivalu! Por ajnaj grupaj renkontiĝoj; inkluzivas precipe 'Ni teatrumu!', staĝo pri Esperanta teatro, Barlastono, Britio. Inf.: EAB, Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Tel. 0845 230 1887; rete: eab@esperanto-gb.org

13–15 januaro
'Drondo', Barlastono, Britio. Esperantlingva diskutrondo (por progresintoj) pri diversaj temoj. Inf.: EAB (vidu supre aŭ paĝon 2).

15–19 januaro
47a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 32a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, Taguatinga-DF (apud Brazilio), Brazilo. Inf.: Evandro Avellar, prezidanto de LKK, Brazila Esperanto-Ligo-Taguatinga Esperanto-Klubo; rete: bel@esperanto.org.br; www.bejo.esperanto.org.br

28–30 januaro
Nacia kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, Rotorua, NZEA, P.O. Box 8140, Symonds Street, Auckland 1150. Tel. (09) 579 4767; rete: exec@esperanto.org.nz; www.esperanto.org.nz

20–24 februaro
Esperanto-konferenco, Alikanto, Hispanio. "Printempo dumvintre kun subtropika klimato: Esperanto, kulturo, librobazaro, feriado". Antaŭ- (18–19 febr.) kaj post-aranĝoj (25–26 febr.). Inf.: Verde Vivi, Querstr. 11, DE-66287 Quierschied, Germanio. Tel. +49-171-6972721; rete: drfjd@web.de

25 februaro–3 marto
Mediterranea Esperanta Semajno, St Raphaël, Résidence Val d'Esquière-Les Issambres, Francio. "Venu al la Mediteranea Maro, kie floras

mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro." Inf.: Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR-83700 Saint-Raphaël. Rete: prezmoni@hotmail.com; tel. +33(0)494830688

9–11 marto
Internacia Semajnfino de JEB, Kembriĝo, Britio. Inf.: Daniel White; rete: komitato@jeb.org.uk; www.jeb.org.uk

4–10 aprilo
Internacia Junulara Festivalo, Cattolica, Romanjo, Italio. Temo: "Novaj lingvaĵoj por novaj komunikiloj: de Leibniz al Zuckerberg, tra Turing". Inf.: <http://iej.esperanto.it/ijf/2012/index.eo.php>

5–12 aprilo
3a PRINTEMPE, Marienburg, Zell/Mosel, Germanio. "Pasigu agrablajn paskajn tagojn en belaj domo kaj pejzaĝo". Inf.: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wicelstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin; rete: lu.esperantoland@gmx.de

14–21 aprilo
Printempa Semajno kun ILEI. Preparado por KER-ekzameno, Grezijono (apud Baugé), Francio. Inf.: Esperanto-KulturDomo, Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce. Tel.-respondilo: +33-2.41.89.10.34; rete: kastelo@gresillon.org

20–22 aprilo
93a Brita kaj 107a Skota kongreso de Esperanto, Edinburgo, Skotlando. "La organiza skipo promesas provizi la kongresanojn per ne nur interesa Esperanto-programo, sed ankaŭ per pluraj ekskursoj." Inf.: EAB

21–28 aprilo
Fringoj por infanoj, Grezijono, Francio. Inf.: Esperanto-KulturDomo (vidu supre).

27 aprilo–1 majo
Krokodila Renkontiĝo 2012, Arrout, Francio. "Kvar tagoj da umado en Pirinea montara vilaĝo." Inf.: Christophe Chazarein, 98 rue Riquet, FR-31000 Toulouse; rete: krokodila2012@gmail.com

28 aprilo
36a Malferma Tago de la Centra Oficejo, Roterdamo, Nederlando. Prelegoj, libroprezentadoj, filmoj; io iel ligita al la 50a datreveno de la ekfunkcio de la CO en ties nuna domo. Inf.: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam; rete: uea@co.uea.org

29 aprilo–9 majo
24a Aroma Jalto, Ukrainio. "Esperanto-festivalo, kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la belega naturo de Krimeo." Inf.: Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kijiv-133, UA-01133 Ukrainio; rete: volodomir@ukr.net

Some Esperanto magazines 2012

The following Esperanto magazines may be subscribed to via Esperanto House. Cheques should be payable to 'Esperanto-Asocio de Britio'.

- ☆ *La Gazeto*. Cultural. Six yearly. £25.50
- ☆ *Juna Amiko*. For young Esperantists. Quarterly. £14
- ☆ *La Kancerkliniko*. 'Alternative' view of 'Esperantoland'. Quarterly. £23
- ☆ *Litova Stelo*. Lithuanian, general. Six yearly on-line (see letter on p. 14). £13
- ☆ *Monato*. High quality, current affairs. Monthly. £44 (by air £48, by e-mail £26.40)
- ☆ *La Ondo de Esperanto*. General, social-cultural. Monthly. £35 (by air £39.50, by e-mail £11)
- ☆ *Scienca Revuo*. Quarterly. £19 (incl. membership of ISAE)
- ☆ *Laŭte*. Libertarian, plenty of reading. Six yearly. £14
- ☆ *La Jaro*. £5 (£7 by air)

10–12 majo

13a Israela Kongreso de Esperanto, Bet Shean. "Tri-taga kunveno kun riĉa programo; eksterlandaj gastoj bonvenaj. Antaŭ- kaj post-kongresa Esperanto-turismado tra Israelo kaj Jordanio." Inf.: Esperanto-Ligo en Israelo; rete: eli@esperanto.org.il

16–20 majo

Printempa BARo 2012, Bad Münden (inter Hanovro kaj Hameln), Germanio. "En la arbaro, tial ideala por familioj kun infanetoj." Inf.: Andi Münchow, Oberstr. 15, DE-30167 Hannover; rete: andim@gmx.li18

19–21 majo

9a MEKARO–Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto, Kebeko, Kanado. "Turisma amikeca semajnfino, kun vizitoj kaj komunaj manĝoj." Inf.: Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québec, H2G 2R8; rete: informo@esperanto.qc.ca

19–25 majo

64a Internacia Fervojistia Esperanto-Kongreso, Herzberg am Harz, 'la Esperanto-urbo', Germanio. Krom fakaj programeroj, proponas konatiĝon kun Herzberg, vizitojn al la plej belaj lokoj de la Harz-montaro (ekz. Göttingen, Goslar), tuttagan ekskurson kaj pli. Inf.: Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6. Tel. +49/(0)5521-5983; rete: esperanto-zentrum@web.de

20 majo

Sveda Esperanto-Kongreso, Helsingborg, Svedio. "Prelegoj, jarkunveno, ekskursoj, distraĵoj ... en bela Helsingborg, la Perlo de la Sundo." Inf.: SEF, Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, SE-113 42 Stockholm; rete: sefkongr2012@esperanto.se

8–15 junio

Esperanto-kurso kun antaŭekskurso, Heinävesi, Finnlando. "La jam tradicia kursosemajno en Popola Instituto de Valamo (10–15 junio). Ĉiuj kursoniveletoj, kun kursanoj el la tuta mondo. Instruos Atilio Orellana Rojas kaj Tiina Oittinen. Antaŭekskurso ĉe muminoj en Muminmondo de Naantali kaj Muminvalo en Tampere (8–10 junio)." Inf.:

Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki; rete: eafsekretario@esperanto.fi

17–20 junio

Renkonto de Interkant', preparado de "Karmen'", Grezijono, Francio. Inf.: Eo-KulturDomo (vidu supre).

22–24 junio

10a Kongreso de Kroataj Esperantistoj, Koprivnica, Kroatio. "Jubilea landa kongreso kun simpozio pri la 125a datreveno de Esperanto; kultura kaj junulara programoj, turisma ekskurso en la regiono." Inf.: Kroata Esperanto-Ligo kaj Dokumenta Esperanto-Centro, DEC, p.p. 79, HR-48350 Đurđevac; rete: kroata.kongreso@gmail.com

22–25 junio

Landa Kongreso de Esperanto-USA 2012, Richardson, Teksaso, Usono. Okazos en Universitato de Teksaso, Dallas. Inf.: Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530; rete: lk2012@esperanto-tx.org

27 junio–3 julio

2a Internacia Esperanto-Semajno en Erevan kaj la ripozurbo Caghkadzor, Armenio. Temo: "La libro kiel rimedo de kultura dialogo." Inf. rete: ies-2.armenio@area.am

30 junio–8 julio

Roskilde-Festivalo, Roskilde, Danlando. "La ĉiujara muzikfestivalo, kun senpaga partopreno por esperantistoj–volontuloj." Inf.: DEJO; rete: roskildefestivalo@gmail.com

10–15 julio

18a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso, Opava, Ĉeĥio. Ĉeftemo "Depresio kiel kromefiko de kronikaj malsanoj". Inf. rete: Eva.Kopecna@ivax-cz.com

meze de julio

Trajne tra Rusio kaj Ĉinio survoje al la 97a UK, Hanojo. Dusemajna Esperanto-vojaĝo transsiberia (vizito al Moskvo kaj lago Bajkal) kaj Ĉinio (vizito al Pekino). Inf.: Tatjana Loskutova; rete: lota49@mail.ru

meze de julio

3a Mongola Kongreso de Esperanto, Ulanbatoro, Mongolio. "Mongola Esperanto-Societo okaz-

igos kun riĉa programaro kaj allogaj ekskursoj. Invitas eksterlandajn esperantistojn." Inf.: Mongola Esperanto-Societo, MN-15160, CPO Kesto 2545, Ulanbatoro; rete: mn_esperanto@yahoo.com

14–20 julio

Internacia Esperanto-Konferenco (de OSIEK), Svitavy, Ĉeĥio. Temo: "Sciencfikcio kaj robotoj". Okaze, eldonejo Kava-Pech preparas luksan eldonon de la dramo *R.U.R.*, en kiu Karel Čapek la unuan fojon uzis la terminon *robot*, kiun transprenis preskaŭ ĉiu lingvo en la mondo. Inf. rete: chrdle@kava-pech.cz

16–20 julio

9a Eŭropa Esperanto-Kongreso (de EEU), Galivo, Irlando. Inf.: Eŭropa Esperanto-Unio: http://eeu-kongreso.webnode.com

21–29 julio

Somera Esperanto-Studado. La 5a renkontiĝo de lernantoj de *lernu.net* (sed ne nur de ili) en Nitra (90km-ojn de Bratislavo), Slovakio. Antaŭtagmeze lernado; ptm ekskursoj, prelegoj, manlaboroj; vespere amuzado. Inf.: petro@ikso.net

21 julio – 18 aŭgusto

Kvar someraj semajnoj: seminario, turisma semajno, Esperanto-kursoj, Grezijono, Francio. Inf.: Esperanto-Kulturcentro (vidu supre).

New Members of EAB

Graham Brown, Glenanne
Richard Hall, Caergwrle
Daniel Pitt, Harrow on the Hill
Terry R. Watts, Ramsgate

New Supporter

M.D. Lang, Southampton

Deceased member

B.W.G. Phillips, Hastings

CONGRATULATIONS

Completed the Accelerated Course

Jonathan Webley, Newton Mearns

Exam success

Jonathan Wedley, Newton Mearns (Distinction)

28 julio–4 aŭgusto
97a Universala Kongreso de Esperanto, Hanojo, Vjetnamio.
 Inf.: UEA (vidu la kolofonon)

4–12 aŭgusto
Amika rondo, N. Tagil, Rusio. “La aranĝo estos dediĉita al la festotagoj de nia urbo.” Inf.: Larisa Kuzmenko, Esperanto-klubo, str. Kushvinskaja 25A, N. Tagil, RU-622013, Sverdlovskaja reg.; rete: klarisa8@yandex.ru

5–12 aŭgusto
68a Internacia Junulara Kongreso, Tenri, Japanio. Temo: Popolanoj ligitaj per la interreto. Inf.: TEJO, ĉe UEA; www.ijk2012.org

5–15 aŭgusto
Esperanto-turisma marŝo ‘Milan Zvara’, Karpata montaro, Ukrainio. Piedmarŝo de la vilaĝo Dovhe, kie naskiĝis fama slovakaj esperantisto Milan Zvara en la provinco Zakarpata, al la plej alta monto de Ukrainio, Hoverla. Inf.: Volodimir Hordijenko, p/k 35, UA-01133 Kijiv-133; rete: volodomir@ukr.net

16 septembro
6a kongreso de AEH-IKEH (handikapitaj esperantistoj), ripozdomo Krucenburku (Skorpia valo ĉe Krucenburk), Ĉeĥio. Inf. rete: aeh-ikeh@volny.cz

27–30 septembro
Trilanda konferenco, Břeclav (plej suda Moravio), Ĉeĥio. La unua komuna konferenco de aŭstraj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Inf.: www.esperanto.cz/cs/akce/konference-tri-zemi-444.html; ces@esperanto.cz

24 novembro
37a Malferma Tago de la Centra Oficejo, Roterdamo, Nederlando. Prelegoj, libroprezentoj, filmoj. Inf.: UEA (vidu la kolofonon).


julio (preciza dato decidota) 2013
98a Universala Kongreso de Esperanto, Rejkjaviko, Islando.
 Inf.: UEA (vidu la kolofonon).

Fondaĵo Canuto

Multaj esperantistoj tra la Tria Mondo arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas al UEA teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj, ekzemple en evolulandoj.

EAB povas senpage plu-sendi vian donacon al UEA. Bonvolu klare menciigi “Por Fondaĵo Canuto”.

Antaŭdankon pro via solidareco!



Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

‘PoMEGo’ – kiel oni jam karese kromnomas ĝin! – celas ordinarajn esperantistojn, kiuj volas studi la gramatikon, vortfaradon, skribon kaj elparolon de la Internacia Lingvo. Ĝi estas unuavice **praktika konsultlibro kaj lernilo**, ne teoria verko por lingvistoj.

Plena manlibro de Esperanta gramatiko klarigas la lingvon en **facila maniero** – kaj la plej bazajn aferojn, kaj tre specialajn detalojn. Ĝi uzas por helpi al la klarigoj **abundon da ekzemploj**, inter kiuj estas multege da ekzemploj el la Fundamento kaj la verkaro de Zamenhof.

La libro estas bele presita, profesie enpaĝigita kaj fortike bindita. La kompilinto, Bertilo Wennergren, estas la Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro de Akademio de Esperanto.

Bertilo Wennergren: *Plena manlibro de Esperanta gramatiko*. El Cerrito (CA): Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, 2005. 696 paĝoj, 15 x 23 cm., bindita, kun papera kromkovrilo. ISBN 0-939785-07-2.

- **Vendoprezco ĉe EAB:** po £23 plus sendokostoj de 20% = £27.60